en Oŝmjana). Fine, post la VII Universala Kongreso en Antverpeno, mi translokiĝis en Parizon, kie mi loĝis preskaŭ la tutan jaron (de Aŭgusto 1911 ĝis Julio 1912) tute dediĉinte min al Esperanto kaj Esperantismo.

En Parizo mi preskaŭ ĉiutage estis vizitanta diversajn sekciojn de Pariza Esperantista Grupo, en kiuj mi ankaŭ faris paroladojn, konferencojn kaj lecionojn de Esperanto, kaj en Decembro de pasinta (1911) jaro mi fondis tie „Diversnacian Esperantan Societon Artistan", kiun dum nia unua ĝenerala kunveno la 21 an de Decembro 1911 ni decidis nomi „Zamenhofa Artista Adeptaro", kaj kies reĝisoro estis elektita mi, sekretario-kasisto s-ro H. van Etten kaj sufloro s-ro Blangarin.

La celo de la fondita Societo estas jena:

1.— Propagandi Esperanton per diversaj artoj, prezentataj publike.
2.— Doni al la geesperantistoj la eblecon, dum la horoj de ripozo, agrable kaj utile amuziĝi, aŭdante sian, tiel diri, duan patran lingvon, prezentatan en teatra ludado, muziko k.t.p.
3.— Ekzercadi en partoprenantaj amatoroj bonan artistan guston, disvolvadi en ili la naturan, iafoje kaŝitan talenton, kaj alkutimigadi ilin ludi, muziki, kanti, deklami kaj paroli publike.
4.— Aranĝi enlandajn kaj eksterlandajn artistajn vojaĝojn, por montri en aliaj esperantigataj urboj la belecon de nia kara lingvo kaj tiamaniere akceli ĝian ĉiulokan disvastiĝadon.
5.— Partopreni en teatraj prezentadoj kaj koncertoj dum la estontaj Kongresoj Internaciaj.

Kaj jen estas la ĉefaj principoj de Z. A. A.

I. Nerompebla fideleco al la Fundamento de Esperanto.
II. Libereco, egaleco kaj frateco inter ĉiuj geanoj.
III. Deviga uzado de Esperanto dum ĉiuj niaj kunvenoj.
IV. Forigo de ĉiuj religiaj aŭ politikaj diskutoj.
V. Absoluta sendependeco.



Dum la unua jaro de sia ekzistado, Z. A. A. akiris jam 63 geanojn, apartenantajn al 14 diversaj nacioj kaj tute ĝuste plenumis sian taskon: de Januaro ĝis Julio ni aranĝis en Parizo kvin esperanto-propagandajn spektaklojn; la 3an de Marto, laŭ invito de niaj samideanoj, ni partoprenis en Esperanta Spektaklo-Koncerto en franca urbo Creil kaj, fine, tri niaj anoj (s-ino Schaefer, Romano kaj mi) ludis unuaktan komedion „Urso" dum la Oka Universala Kongreso en Krakovo.

Sendube, ni havis la sukceson, kaj nia kara Majstro doktoro L. L. Zamenhof afable konsentis akcepti la titolon de honora membro de nia Z. A. A!

Sed . . . tiu ĉi esperanta agado ne povis min plene kontentigi! . . . Mi ĉiam pensis, ke nun venis jam la tempo, kiam ni, apostoloj de Esperanto, devas propagandi nian karan lingvon inter tiel nomata „simpla popolo", kiu certe pli ol ni, „kleruloj", bezonas lingvon internacian, kaj pri kiu ni, propagandistoj, seienculoj-gramatikistoj, tro multe nin okupantaj per diversaj lingvaj, sĥolastikaj demandoj, — tute forgesis! . . .

Kaj mi decidis, ke mia devo estas iri al tiu „simpla popolo", nome **iri**, iri piede, sed ne komforte veturi,— kaj doni al ĝi ne ŝtonon, sed panon, kiun alportis nia kara Majstro por la feliĉo de la tuta homaro, sed ne por plezuro de kelkaj feliĉaj kleruloj.

Do, mi decidis iri piede el Parizo en Krakovon al la VIII Kongreso, kaj dum mia piedvojaĝo propagandi nian karan lingvon en ĉiuj laŭvojaj urboj, urbetoj kaj vilaĝoj, kaj tiamaniere akiri inter niaj malfeliĉaj kaj spirite pli malfortaj gefratoj kiel eble plej grandan nombron da adeptoj.

Mia decido estis firma kaj nerompebla, — sed por plisukcesigi mian sufiĉe malfacilan entreprenon, mi volis trovi kelkajn samideanojn, kiuj konsentus akompani min en mia